

& Homoj ĉe l' marbordo:

< Rekante 21 el 41 batoj por strofo, entute 738 paŝoj dum 9 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butikoj, 1931). Baladigis Martin Strid (2017) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por "La amo estas ŝipo".>

(#Melodio:

<:41> (

o;So /dodo dore mido re do;do LaLa LaTi doLa So o;So LaLa LaLa doLa So do o;do TiTi TiTi Tido re

(#Rekantaĵe: e;So dodo dore mido re do;do LaLa LaTi doLa So o;So LaLa LaLa doLa So do o;do dodo mimi mimi mire do)

)×18)+

(&Strofoj:

,& Unua:

'1 Mi /vidis ilin ĉe l' marbordo ; En bankostumo, sen rembur', ; Reveni al natura ordo, ; Al pralinoj de l' figur';

(×:; **Do dancu kune en la ĉeno, ; ni dancu ĝis matena sun' ; kaj ĉiam novaj tagoj venos, ; esperon kaptu do je oportun'.**)

'2 Mi vidis ilin sen glazuro, ; Sen ŝminkoŝel' de civiliz' ; Kaj kial ilin la naturo ; Prezentis iam... senĉemiz'.. ..

,& Dua:

'3 Vestita nur per inkognito ; La baronin' ne pensas plu ; Pri teda devo de vizito ; En la salonoj de l' enu';

'4 Kaj se mi fidas al lorneto, ; Ŝi liberiĝis de bandaĝ', ; De brustoŝnuroj kaj korseto ; La ĉarmojn de matura aĝ'.

'5 Sed tiuj ĉarmoj sen hezito ; Aplikas sekvon de l' instru' ; Kaj siavice, por vizito, ; La mamoj kuras al genu'.. ..

'6 El kio ni konkludas prave ; Eternan veron de l' maksimum': ; "Se la natur' nin tenas sklave, ; Pli sklave tenas nin kutim'!"

,& Tria:

'7 Ĉe l' mara bordo eĉ ministro ; Sin kredas en la paradiz', ; Kaj li dum ripoziga distro ; Forgesas grincon de la Kriz';

'8 Li ludas nun kun sia filo ; Kaj donas pruvojn de kapabl' ; Farante per ludŝovelilo ; Profundajn truojn en la sabl'.. ..

'9 Ne diru, ke mi moke ŝercas ; Per senpripensa rimo-ĵet'! ; Li tre verŝajne sin ekzercas ; Por.. fari truojn en budĝet'.

'10 El kio ni konkludas prave ; Eternan veron de l' maksimum': ; "Se la natur' nin tenas sklave, ; Pli sklave tenas nin kutim'!"

,& Kvara:

'11 Sinjoro Hak. – Ni lin suspektas ; Pri novriĉula pozici'. ; Ĉar sinjorino Hak aspektas ; Kiel juvelekspozici';

'12 Li tre riĉiĝis, – jes ni scias, ; Sed kie do? En kiu fak'? ; Aŭskultu, – nun konversacias ; Kun la edzin' sinjoro Hak:

'13 "Se tiuj nudaj hom-amasoj ; Nun sekvus min kun karn' kaj ost', ; Cent kilometrojn da kolbasoj ; Mi farus je malalta kost'!"

'14 El kio ni konkludas prave ; Eternan veron de l' maksimum': ; "Se la natur' nin tenas sklave, ; Pli sklave tenas nin kutim'!"

,& Kvina:

'15 Kaj bankieron ni invitis. ; "Nin akompanu al la grot', ; Ĉar vi neniam ĝin vizitis, ; Alkuru do kun ban-trikot';

'16 Ni tie banos nin libere ; Sen ia timo de delfen', ; Ĉar tiu groto taŭgas vere ; Mirinde kiel banbasen'!"

'17 Li tiam preĝis al ĉielo ; Tremante kvazaŭ pro komplot'; ; "Ho bona Di' de Izraelo, ; Protektu min de la.. bangrot'!"

'18 El kio ni konkludas prave ; Eternan veron de l' maksimum': ; "Se la natur' nin tenas sklave, ; Pli sklave tenas nin kutim'!"